

NORDHUNGARIA INFORMO

Informilo de „Király Lajos” Esperanto Amika Rondo

ÉSZAKMAGYARORSZÁGI HÍR

A „Király Lajos” Eszperantó Baráti Kör Tájékoztatója

2007. Május
Majo 2007.

2007. MÁJUS	3
MAJO 2007	4
Még áprilisban történt	4
Okazis ankoraŭ en aprilo	4
EGERFARMOS	6
EGERFARMOŜ	7
EGERFARMOS	8
Kiel Andreo alproprigis Esperanton	13
Dr. Dudich Endre	14
Hátha jó a Hatha jóga	14
Juĝo pri jogo	17
Mi történik, mi történt májusban?	19
Kio okazas, kio okazis dum majo?	19
39-a Landa Fervoĵista Esperanto-Amika Renkonto	20
Alighilo	22
A karalábé	23
La brasikrapo	23
A KARALÁBĚS CSIRKE	23
LA BRASIKRAPA KOKIDO	24
Idézetek	24
Citaĵoj	24
NOTOJ PRI LA VIVO DE ADA	25
LA LASTAJ TAGOJ DE ADA, ADUŜKA	26
Paradoxon	30
Paradokso	30
ANEKDÓTÁK	31
ANEKDOTOJ	31
A hideg kávé	31
La malvarma kafo	32
La malvarma kafo	32
LÁTOGATÁS	32
VIZITO	33
Rövid történet a zsidókról Dániában	33
Mallonga historio pri la Hebreoj en Danio	36
A békakirályfi	39
La ranreĝido	41
EURÓPA ESZPERANTÓ UNIÓ 7. KONGRESSZUSA	43
LA 7-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO UNIO	43

2007. MÁJUS

Az év ötödik hava és *Maia* római istenőről nevezték el. Régi magyar neve Pünkösdi hava volt. A Pünkösdi a görög pentékosz=ötvenedik szóból származik, keresztény vallási ünnep, melyet húsvét után 50 nappal tartanak. A zsidó vallásból ered, ahol a pászah után az 50. napon a sabuothkor (a hetek ünnepe) az első gyümölcsöket, majd a Tízparancsolat adományozását ünneplik.

Hazánkban mind a május 1. (májusfa-állítás, kirándulások a szabadba...), mind a Pünkösdi (májuskirálynő választás...) megünnepléséhez sok népszokás fűződik.

Május a tavasz legszebb hónapja. A különböző virágok illata megédesíti a levegőt és megindul a méhek szorgoskodása a nektár begyűjtésére.

Sok gyógynövényünk virágját, levelét, gyökerét ekkor kezdik el gyűjteni, melyek teája ismertén gyógyító hatású.

Néhány közülük:

Akácvirág (köhögéscsillapító, enyhe hashajtó...)

A fái Bodza virágja (teája meghűléses betegségnél izzasztó, köhögéscsillapító...)

Fehér Árvacsalán virág (légcső-, hólyaghurut...)

Gyermekláncfű levél (emésztést serkentő...)

Orvosi hársfavirág (idegerősítő, meghűlésnél izzasztó, köhögéscsillapító..)

Kamillavirág (nyugtató, izzasztó, fertőtlenítő, foghúserősítő...)

Szederlevél (hasmenés ellen, vizelethajtó...)

Pásztor Lászlóné



A kamilla / La kamomilo

MAJO 2007

Ĝi estas la kvina monato de la jaro kaj prinomita de romia diino *Maia*. Ĝia malnovhungara nomo estas monato de *Pentekosto*. La nomo Pentekosto devenas el la greka vorto: pentekos = kvindeka, kaj estas kristana religia festo, kiun oni festas 50 tagoj post Pasko. Kiel festo devenas el la juda religio, kie je la 50-a tago post la *Pesah*, je la „*Sabuoth*” (festoj de semajnoj) oni festas la unuajn fruktojn kaj la donacon de la „Dekalogo”.

En nia patrujo multaj popolaj tradicioj ligiĝas al festado de la unua de majo (starigo de majarbo, ekskursoj en la naturon...) kaj de Pentekosto (elekto de majreĝino...).

Majo estas las plej belega monato de la printempo. Laodoro de la diversaj floroj dolĉigas la aeron kaj ekdiligentadas la abeloj por kolekti la nektaron

Oni ekkomencas kolekti nun la florojn, foliojn eĉ la radikojn de niaj multaj kuracherboj, kies teoj estas konate pri kuracefiko.

Jen kelkaj el inter ili:

Akaciafloro (tustrankviligo, malforta laksigilo...)

La sambukfloro – arba – (dum malvarmumoj ŝvitigefika, tusmalhelpilo...)

Blankflorara Lamio-floro (trakeito, cistito...)

Folioj de Leontodo (je misdigesto, galfunkcion vigligilo...)

Kuracista Tili-floro (nervofortigilo, dum malvarmumo: ŝvitigilo...)

Kamomil-floro (trankviligo, dentviandon fortiganta, seninfektigilo...)

Rubus-folio (kontraŭ diareo...).

Adrienne, s-rino Pásztor

Még áprilisban történt

Dr. Győry-Nagy Lajos, egykori Eszperantó-Területi Bizottságunk elnökének **sírját felkerestük** születésének 115. évfordulója alkalmából, az avasi református temetőben. Vittünk egy csokor tulipánt megemlékezésül és a téli falomból kiszabadítottuk a sírja mellé általunk még 2005. augusztusában ültetett örökzöldeket. A tuják, a lucfenyő, a mahóniabokrok szépen fejlődnek.

Pásztor házaspár

Okazis ankoraŭ en aprilo

Ni vizitis en la reformata tombejo sur monteto Avas **la tombon** de la estinta prezidanto **de** nia Esperanto Teritoria Komitato: ***D-ro Ludoviko Győry-Nagy***, okaze de la 115-a datreveno de lia naskiĝo. Rememore ni surmetis tien unu bukedon da tulipoj, kaj de sub la seka foliaro ni liberigis la ĉiamverdajn kreskaĵojn plantitajn de ni ankoraŭ en aŭgusto de 2005. La tujoj, la piceo kaj la mahonioarbedetoj bele kreskas.

Geedzj Pásztor

Jól sikerült az *Iffusági Esperantó Találkozó Tabon* és a Vas-szegedi Julianna által meghirdetett *gyermekrajz verseny eredmény hirdetése Egerfarmoson*

TAB-on a 98 résztvevő között voltak külföldiek is. A szombati és vasárnapi napra (2007. április 14-15-ig) sok fiatal elment a Szabó Imre által meghirdetett esperantó-nyelvvizsga próba miatt is. A programokban a jelenlevők sokan tevékenyen résztvettek, minden lehetőség adott volt a sikerhez, melyet a szervezők az önzetlen, áldozatkész munkájukkal el is értek.

Tab-on, a „Király Lajos” Esperantó Baráti Körtől én Parkánszkiné Gerő Zsuzsa vettem részt és emlékül megkaptam Szabó Imrétől a most megjelent versfordításkötetét József Attila verseseiből.

Nagyon jól éreztem magam, örülök, hogy elfogadtam Szilvási László meghívását a JER-en részvételre.

Csak gratulálni tudok a szervezőknek a szép sikerhez.

Parkánszkiné Gerő Zsuzsa



Csoportkép a JER résztvevőiről / Grupbildo pri la partoprenantoj de la JER

En urbeto **TAB** inter la 98 partoprenantoj de JER, estis ankaŭ eksterlandanoj. Al sabato, dimanĉo (la 14-15-an de aprilo 2007) pro la Esperanto-lingvoekzamenprovo – anoncita de mem la ekzameninto Imre Szabó – multnombre iris gejunuloj tien. Programoj estis abunde kaj pr. ĉiuj partoprenis. Ĉiu ebleco estis donita al la bonsukceso (ankaŭ la vetero helpis), kion la organizantoj atingis kun siaj malegoismaj, oferaj laboroj.

Dum JER en Tab partoprenis mi Suzana Gerő, s-rino Parkánszki de nia Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” el Miskolc. Mi ricevis donace la ĵus aperintan tradukaĵaron de Imre Szabó, el poemoj de Attila József.

Mi sentis min bonege kaj tre ĝojas pro akcepto de invito de László Szilvási por partopreni en JER. Mi povas nur gratuli al la organizantoj.

Suzana Gerő, s-rino Parkánszki

EGERFARMOS

Egerfarmos községbe,- Magyarország 6-os régiójában van - (mely a magyarokhoz vérszerződéssel csatlakozott kabar Bors vezér birtoka volt a honfoglaláskor és azóta is lakott terület), a Pásztor házaspár nem jutott el betegség miatt, de ott a „Király Lajos” Eszperantó – Baráti Kört Fedor Istvánné és Dudás József képviselte 2007. április 15-én a rajzverseny eredményhirdetésén.

Az alábbiakban Fedorné Ilona beszámolóját olvashatják a rendezvényről.

„Könnyen megtaláltuk a falut – írja Fedorné Ilona tanárnő: -, tíz óra körül már ott is voltunk. A program kezdete 11 óra volt. A rajzkiállítást a Művelődési Házban rendezték, ott zajlott az egész rendezvény, de előtte az Eszperantó Házban gyülekeztek a résztvevők, mi is odamentünk először. Az Eszperantó ház felé az utat táblák jelezték ESPERLANDO felirattal. Ez, egy üresen álló ház, amit a tulajdonos el akar adni, de évek óta nem sikerül, és most egy évre odaadta az eszperantistáknak használatra. Nagyon szép tervek vannak vele a jövőre nézve, de ahhoz sok pénz kellene. A Művelődési Házon is eszperantó nyelvű felirat fogadta a vendégeket.

Sajnos, nem ismertünk minden jelenlevőt, így csak annyit tudok, hogy ott volt: Baksa József MESZ elnök, Ködmön Károlyné a magyarországi fő- eszperantista küldött és megbízott (az UEA felé), Könczöl Ernő klubelnök Egerből, Prohászka Antal és a felesége grafikusművészek Szolnokról, a rendező Vas-szegedi Julianna Tiszafüredről, a helyi polgármester asszony Poczokné Blanár Gabriella, Szabó József eszperantó-klub titkár Egerfarmosról, Budapestről Szabó Imre az Eszperantó Vizsgáztató Bizottság tagja, Miskolcra Dudás József, én a férjemmel és még sokan mások.

A kiállítást az általános iskolások műsora nyitotta meg; eszperantóul énekeltek és egy kisfiú, aki még csak ovódás, verset is mondott eszperantóul. A kiállításra érkezett rajzok nagyon tetszettek mindenkinek. A megnyitó (ezt a polgármester asszony tartotta) után Szabó Imre mutatta be a most megjelent, József Attila verseinek fordításait tartalmazó könyvét. Fel is olvasott belőle.

Az eredményhirdetés egy órakor volt, addig sétáltunk a faluban, mert nagyon szép idő volt.

Az Önkormányzat megvendégelte a jelenlevőket, rengeteg hidegtálat készítettek. Nagyon kitettek magukért.

Egészében véve nagyon jó volt a rendezvény. Nekem a lelkesedésük tetszett a legjobban, manapság ritkán látni ilyet.”

Most pedig, tekintsék meg FedorIstvánné fotóit a rendezvényről



EGERFARMOS

La 15-an de aprilo 2007, la geedzoj Pásztor pro malsano ne povis vojaĝi en vilaĝon Egerfarmos – situanta en la sesa regiono de Hungario – (kio estis la bienposedaĵo en 896, de estro Borš la Kabaro, kiu aliĝis pere de sangokontrakto per sia tribo al la sep hungaraj triboj antaŭ ilia landkonkero, kaj la tereno ankaŭ pli poste loĝita estis ĉiam). Sed la Esperanto-Amikan Rondon „Király Lajos” reprezentis s-ino Ilona, Fedor kaj s-ro Jozefo Dudás dum la tiea festa rezulto-anonco de la desegnokonkurso..

Sube, Vi povos legi la raportojn pri la evento de Ilon, Fedor kaj Julianna Vas-szegedi.

„Ni facile trovis la vilaĝon – skribas instruistino Ilona Fedor: - ĉ. la deka horo ni estis jam tie. La programo komenciĝis je la 11-a. Oni aranĝis la ekspozicion en la Kulturdomo, tie okazis la tuta evento, sed antaŭ ĝi la partoprenantoj ariĝis en la Esperanto-Domo. Ankaŭ ni iris tien unue. La vojdirekton al la Esperanto-domo tabuloj montris kun la subskribo ESPERLANDO. La Esperanto domo estas unu malplena domo, kion la posedanto volas forvendi sensukcese ekde jaroj, kaj nun tradonis al la esperantistoj por uzo, dum unu jaro. La esperantistoj havas per ĝi tre belajn planojn, sed tiuj bezonus tre multe da mono.

Ankaŭ sur la Kulturdomo akceptis la gastojn Esperantolingva pordega surskribaĵo.

Bedaŭrinde, ni ne konis ĉiun ĉeestanton, tiel mi scias nur tion, ke tie estis:

De HEA s-ro prezidanto Jozefo Baksa, la hungara ĉefdelegito s-ino Elizabeta Ködmön, el urbo Eger la E-klubprezidanto Ernő Könczöl, el urbo Szolnok la grafikistoj geedzoj Prohászka, s-ino Julianna Vasszegedi el Tiszafüred kiu aranĝis la konkurson, el Budapeŝto Imre Szabó, el Egerfarmos la vilaĝestrarino Gabriella Blanár s-rino Poczok, kaj Jozefo

Szabó, la sekretario de E-klubo - krome multaj aliaj el la setlejo – kaj el Miskolc Jozefo Dudás kaj mi kune kun mia edzo.

La ekspozicion malfermis la programo de la bazlernejanoj: ili kantis esperante, krome iu infanĝardena knabeto poemon deklaris same esperantlingve. La ekspoziciitaj desegnaĵoj alvenintaj al la konkurso, plaĉis al ĉiu. Post la festa inaŭguro (kiun faris la vilaĝestrarino sinjorino Gabrielle Blanár Poczokné) sinjoro Imre Szabó prezentis lian libron, kiu enhavis siajn poemtradukojn de poeto Attila József. Li laŭtleĝis el inter tiuj.

La rezultanonco okazis je la 13-a horo, ĝis tiam ni promenadis en la vilaĝo, ĉar tre bela vetero estis. La vilaĝestraro gastigis la ĉeestantojn kun multegaj manĝaĵplenaj malvarmpladoj. Ili estis tre gastamaj.

Laux mia opinio la tuta arango estis tre bona. Al mi plaĉis cefe ilia entuziasmo, ĉar nuntempe oni povas sperti simildon nur malofte.”

EGERFARMOS

A következő üzenetet Vas-szegedi Julianna rendezőtől kaptuk eszperantó nyelven az eredményhirdetésről:

Kedves Barátaim!

Vasárnap, április 15-én ment végbe a megnyitója az általános iskolások nemzetközi rajzversenyének Egerfarmos községben Magyarországon. A téma a Húsvét volt. Különböző módon rajzolhattak. A gyerekek nagyon alkotó szelleműek, a képeken láthatják!

Köszönjük a Magyarországi Eszperantó Egyesület, Baksa József, a falubeliek, Egerfarmos polgármesterének és Vas-szegedi Julianna (Tiszafüred) segítségét a nagy munkában, szervezésben és ennek a programnak a kibontakoztatásában.

Összesen 119 rajz érkezett két kontinensről, 7 országból, 11 iskolából. A zsűritagok nagyon nehezen tudtak dönteni a szép képek között. Végül megszületett a döntés, íme:

I. kategória, 6-10 évesek

1. Joanna Ficek, Lengyelország, Bierun, a kép száma: 84

Laura Pociute, Litvánia, Linkaiciai, 17-es sz.

2. Venesz Dávid, Magyarország, Egerfarmos, 3-as sz.
3. Sara Madej, Lengyelország, Rybnik, 34-es szám

Különdíjazottak

Jesika Polerowicz, Lengyelország, Rybnik, 31-es kép szám

Emilia Czarny, „ „ , 32-es kép szám

Symon Szeliga, „ „ , 35-ös kép szám

Venezs Gergő, Hungario, Egerfarmos, 2-es kép szám (Ő csak 5 éves)

Martina Galovic, Horvátország, Zágráb, 62-es kép szám

Jónás Éva, Magyarország, Egerfarmos, 110-es kép szám

II. kategória, 11-15 évesek

1, Aneta Kordowska, Lengyelország, Bierun, 79-es számú kép

2, Korvel Blazek, „ „ , 73-as kép

Darina Aniol „ „ , 78-as kép

Jáger Dóra, Magyarország, Tiszafüred, 115-ös kép

3, Ugué Stederyté, Litvánia, Meskuiciai, 10-es kép

Jugrida Bucinskaite, „ „ , 12-es kép

Pedro, Brazilio, 22-es kép

Különdíjazottak:

Klára Retonová, Csehország, Ratiskovice, 36-os kép

Sarah Wenheuer, Németország, Herzberg, 4-es kép3

Közönségdíjasok:

I. kategória

Venezs Dávid, Magyarország, Egerfarmos

Farkas Vivi, Magyarország, Tiszafüred

Akvile, Litvánia

Korpás Laura (Egerfarmos)

II. kategória

Lukas, Lengyelország

Jáger Dóri (Tiszafüred)

Ugué, Litvánia

A kiállítást ezen a héten minden délután meg lehet tekinteni Egerfarmos község Kultúrházában. A következő héten átküldjük a műveket a Szolnok városi „Barátság” Eszperantó Egyesülethez (Magyarország), mint vándorkiállítást. A díjakat folyamatosan küldjük meg a díjazottaknak postai úton április végéig.

Ez a kiállítás az első volt Egerfarmos esperantista életében, de nem az utolsó, Karácsonyra ismét rendezünk rajz versenyt.

Szívből gratulálunk minden résztvevőnek, hiszen minden mű nagyon szép volt!

Poczokné Blanár Gabriella Egerfarmos polgármesternője, Szabó Zoltán az egerfarmosi Esperlando Esperanto Klub titkára nevében is

A REA szervezője Tiszafüredről: Vas-szegedi Julianna

Vas-szegedi Julianna beszámolóját magyarra fordította Pásztor Lászlóné

Kaj nun, bonvolu legi raporton pri la **desegnokonkursrezult-anonco** el Egerfarmos, de *Julianna Vas-szegedi*:

„Karaj geamikoj!

Dimanĉe, la 15-an de aprilo okazis la solena malfermo de la internacia desegno-konkurso por bazlernejanoj en vilaĝo Egerfarmos, Hungario. La temo estis: Pasko. Oni povis desegni diversmaniere. La infanoj estis ege kreativaj, sur la bildoj vi povas vidi!

Ni dankas la helpon de Hungara Esperanto-Asocio, Jozefo Baksa, vilaĝanoj kaj vilaĝestrino de Egerfarmos, kaj Julianna Vas-Szegedi (Tiszafüred) por la granda laboro, organizado kaj disvolvado de tiu programo.

Alvenis entute 119 desegnaĵoj el du kontinentoj, el sep landoj, el 11 lernejoj. La ĵurianoj tre malfacile povis decidi inter la belaj bildoj. Fine naskiĝis la decido, jen:

I. kategorio, 6-10 jaraj

1, Joanna Ficek, Pollando, Bierun, numero de la bildo: 84

Laura Pociute, Litovio, Linkaiciai, nr. 17

2, Venesz Dávid, Hungario, Egerfarmos, nr. 3

3, Sara Madej, Pollando, Rybnik, nr. 34

Ekstrapremiitoj:

Jesika Polerowicz, Pollando, Rybnik, nr: 31

Emilia Czarny, „ „ „ , nr.32

Symon Szeliga, „ „ „ , nr.35

Venezs Gergő, Hungario, Egerfarmos, nr: 2 (Li estas nur 5 jara)

Martina Galovic, Kroatio, Zagrab, nr: 62

Jónás Éva , Hungario, Egerfarmos, nr:110

II. kategorio, 11-15 jaraj

1. Aneta Kordowska, Pollando, Bierun, nr: 79

2. Korvel Blazek, „ „ „ , nr:73

Darina Aniol „ „ „ , nr.78

Jáger Dóra, Hungario, Tiszafüred, n: 115

3. Ugué Stederyté, Litovio, Meskuiciai, nr: 10

Jugrida Bucinskaite, „ „ „ , nr: 12

Pedro, Brazilio, nr.22

Ekstrapremiitoj:

Klára Retonová, Ĉeĥio, Ratiskovice, nr: 36

Sarah Wenheuer, Germanio, Herzberg, nr: 43

Premiitoj de la publiko:

I. kategorio

Venezs Dávid, Hungario, Egerfarmos

Farkas Vivi, Hungario, Tiszafüred

Akvile, Litovio

II. kategorio

Lukas, Pollando

Jáger Dóri (Tiszafüred)

Ugué, Litovio

La ekspozicion oni povas spekti ĉi-semajne en Kulturdomo de vilaĝo Egerfarmos, ĉiuposttagmeze. Sekvontsemajne ni trasendos la verkojn al la „Amikeco” Esperanto-Asocio de urbo Szolnok (Hungario), kiel migran ekspozicion. ☺

La premiojn ni sendos daŭre al la gajnintoj paperpoŝte ĝis la fino de aprilo.

Elkore ni gratulas al ĉiuj partoprenantoj, ja ĉiu verko estis tre bela!

Kaj nun la bildo pri Ilona Fedor

Esperantistaj infanoj (Egerfarmos, Tiszafüred) deklamis esperantajn salut-kantojn al la gastoj helpe de Kornélia Nagy, esperantistino.



La vilaĝestrino, S-ino Gabriella Blanár malfermis la ekspozicion: (Sur la eta bildo, apud Gabriella staras S-ro Zoltán Szabó, kiu komencigis la Esperantan vivon en la vilaĝo)

Dum la ekspozicio Julianna Vas-Szegedi (organizantino de la evento) prezentis freŝeldonitan libron de Imre Szabó, ene tradukaĵoj de la granda hungara poeto, Attila József:

Venis multaj gastoj el diversaj urboj (Miskolc, Zalaegerszeg, Szolnok, Nyíregyháza, Tiszafüred, Budapest, Eger, Egerfarmos ...por admiri la verkojn:

Tiu ekspozicio estis la unua en esperanta vivo de Egerfarmos, sed ne la lasta, por Kristnasko ni denove organizos desegno-konkurson.

Julianna Vas-Szegedi (Organizantino, REA, Tiszafüred, ankaŭ en nomo de Poczokné Blanár Gabriella, vilaĝestrino, Egerfarmos, Zoltán Szabo, sekretario de „Esperlando”, Egerfarmos.)”

Blazio Vaha

Kiel Andreo alproprigis Esperanton

Iam mi estis komenconto,
baldaŭ iĝis t u j-komenconto;
lunde mi estis komencanto;
marde mi estis ĵus komencinto.

Komencinto ordinara...
Jes, mi restadis komencinto!
Sed ja mi dume progresadis!
Po s t-progrese mi progresinto

Mi eksentis,
ĝojis mi, se
oni diradis al mi jam, ke
klare: mi estas progresinto
ĉar mi progresis jam tre multe!

Progresantoj kaj progresintoj,
iĝis ekzamen-sukcesintoj,
ho jes ankaŭ mi plensukcesis,
mian diplomon karesis.

Poste iĝis mi postrestanto,
diligente mi postrestadis,
iam pro malintensaj kursoj
mi tre intense protestadis.

Malgraŭ ofteta sukcesado
sekvis intensa forgesado,
iĝis mi bona forgesanto,
kaj mi fariĝis forgesinto!

En la kurso por forgesintoj
mi akiros sciojn plej novajn:
por intensa reforgesado
havos mi bazon plej betonan!

Kedves olvasóink!

Egészség-megőrző programunkat folytatjuk. Kérjük, fogadják szeretettel Dr. Dudich Endre úr előadásának szövegét a Hatha Jógáról.

Dr. Dudich Endre **Hátha jó a Hatha jóga**

Kórelőzmény

Az 1946. év egy szép májusi vasárnapján, Sopron városában egy 11. éves fiú összeesett a szentmise alatt. Nem tudott ráállni a bal lábára és a térde alatt erősen fáj a bal lábszára. Az orvosok sípcsonti csontvelőgyulladást állapítottak meg.

A fiú két hetet kórházban, két hónapot otthon ágyban, két évet pedig magántanulóként Budapesten töltött. Nem tudott rendesen és hosszan járni. Sportolásról még csak nem is álmodhatott.

Egy tanuló társa azt tanácsolta neki, hogy jógázzon, mert a jóga nem erőlteti meg a lábat. Így a fiú jógázni kezdett, beleértve a jóga-úszást is.

Két évvel később részt vett a gimnázium 1500 m-es futóversenyén, majd már geológushallgatóként terepfutásban és hosszú kirándulásokon. Ezen kívül rendszeresen úszott, még télen, jeges vízben is.

Tanuló társa, aki bevezette a jógázásba, neves orvosprofesszor lett és magánklinikája volt – Kaliforniában.

Tehát mi ez a jóga?

Erről igen eltérő, sőt ellentétes vélemények vannak. Csak annyi bizonyos, hogy indiai eredetű testi-léleki gyakorlatozásról van szó. A filozófiai háttér / alap a világ szellemi egysége, az emberi léleknek a Világlélekkel, **Atmannel** való azonossága (panteizmus). Ezt az elvileg létező egységet az ember képes nemcsak értelmileg megismerni, hanem át is élni a gyakorlatban. Ez a „megvilágosodás”: Te vagy Az! Ehhez a célhoz több út vezet, az önmagunkon való uralom megszerzése révén (**jóga=iga!**). Ezeket rendszerezte és leírta **Patandzsali** a szutráiban.

- a test jógája
- az érzelmek jógája
- a megismerés jógája
- a nemiség jógája
- a királyi jóga

A jóga nyolc fokozata:

1. Fegyelem
2. Önfegyelem
3. Ülémód, testtartás
4. Lélegzés-szabályozás
5. Visszahúzódás önmagamba
6. A figyelem összpontosítása
7. Elmélkedés/szemlélődés
8. "Felszívódás": a teljes egyesülés az elmélkedés tárgyával.

Az **Upanisádokban** (a Titkos Tanban) ez áll megírva:

„Nincs nehezebb út a világon, mint a jógiké: igen kevés ember jár rajta! De az, aki ezt választja, mindörökké megtisztul...Nem panaszkodik hidegre vagy melegre, nem törődik azzal sem, hogy megszabadult-e már a lélekvándorlás hat hullámától...Membékélten, mozdulatlanul, így szól: Én vagyok az Egy, az Öröm, Tudat!”...és ezzel vándorlása végetért.”

(Parama-Hamsza / Vándormadár / Upanisád)

Ehhez az embernek vezetőre, **gurura** van szüksége:

„aki jól ismeri a jógát és valójában gyakorolja azt, akinek lelkét átalakítja és megtisztítja a jóga! Csakis olyan tanító, aki tiszteli mestereit és az Úr hűséges szolgája, méltó a **Guru** névre. Mert Gu a sötétség és Ru a fény, amely azt eloszlatja; így győzi le a guru a Nem-tudást.” (Advaja Taraka, a „Révész” Upanisádja).

Magyarországon a 20. század első felében **Baktay Ervin** és **dr.Weninger Antal** voltak a jóga lelkes propagálói. Igen népszerű volt **Szelva Radzsa Jeszudiannak** a Hatha-Jógáról írt könyve is.(„Sport és jóga”)

Mellette és ellene

A híres svájci pszichiáter **C. G. Jung** saját tapasztalata alapján arra figyelmeztetett, hogy a jógázás káros lehet a nyugati ember pszichés egészségére, mivel teljesen eltérnek a kulturális hagyományai a keletiekétől.

A 20. század második felében sok guru jelent meg az Egyesült Államokban és Európában, hogy „elhozzák a lelkieken szegény Nyugatnak a Kelet világosságát.”Nehéz megkülönböztetni a pénzsóvár szélhámosokat az őszinte bölcsektől, különösen a **New Age**

(Új Korszak) ezoterikus és ál ezoterikus áradatában. A hagyományos keresztény világnézettel és lelki fegyelemmel való összeütközés elkerülhetetlenné vált.

A francia **J. M. Dechanet** írt egy könyvet: Keresztény jóga tíz leckében azt állítva, hogy a Ha-tha (Nap-Hold) jógának csak az „egészséges magját”, a lényegét tartotta meg.

Gál P. (katolikus pap) „A New Age keresztény szemmel” c. könyvében részletesen ismerteti a jógát is, valamint azt, amit ő guruizmusnak nevez. Következtetése kompromisszummentesen negatív. Keresztény hívő nem fogadhatja el az alábbiakat:

- 1) *Filozófiailag* – a panteizmust;
- 2) *Teológiailag*: az ember egyéni, szellemi lelkének nem-létét és az újraszületést (lélekvándorlást);
- 3) *Etikailag*: Az önmegváltást mint célt, a több életen át húzódó karma tanát, valamint a jóval és rosszal szembeni individualista közömbösséget;
- 4) *Lélektanilag*: potenciálisan veszélyes, esetleg ördögi erők (**Kundalini**, a kígyóistennő) felszabadítását és a felsőbbrendű ember gurunak való fenntartás nélküli engedelmességét.

Személyes következtetés

Én, az egykori beteg fiú, személyes tapasztalat alapján úgy vélem, hogy a Hatha Jóga technikája lehet pszichoszomatikusan gyógyító és erősítő hatású és nem szükséges összekapcsolni nem-keresztény világnézet elfogadhatatlan nézeteivel. De hangsúlyoznom kell, hogy ez nem könnyű ügy: erős testi, értelmi és erkölcsi előkészületre és állandó kontrollra van szükség, nem guru, hanem keresztény lelki vezető részéről, hogy a végzetes csapdákat el lehessen kerülni.

Válogatott irodalom

Déchanet. J. M.: Keresztény Jóga tíz leckében – Sport Kiadó, Budapest 1991

Deussen, Paul: Filozofia upanişadelor

- 320 p., Ed. Tehnica, Bucureşti 1994

Dudich Andre: India erdei bölcsesége. Az ezerarcú Upanisádok: látszat és valóság – In: Kalandozás a filozófia történetében, IV/1—A Filozófiai Vitakör évkönyve, Budapest 2000, 239.255. old

Gál Péter: *A New Age keresztény szemmel*. 5. kiadás. – Lámpás kiadó, Abaliget 1997

Jung, C. G.: Bevezetés a tudattalan pszichológiájába. – Európa Kiadó, Budapest 1990

Ruchpaul, Eva: *Le Hatha Yoga* – 188. p, Ed. Denoël, Vitry-sur-Sine, 1985

Selva Raja Yesudian: *Jóga hétről-hétre. Gyakorlatok és meditációk egész évre.* – 243 old, Lazi Bt, Szeged, 2000

Weninger Antal: *A kelet jógája.* Budapest 1987

Weninger Antal: *A jóga a mindennapokban.* – Nótárius Kiadó, Budapest 1991

Budapest. 2005. május 25-én



Karaj niaj legantoj!

Ni daŭrigas nian sano-gardantan programon. Bonvolu akcepti bonkore la prelegtekston de sinjoro profesoro

D-ro Dudich, Endre

Juĝo pri jogo

Anamnezo

Unu belan majan dimanĉon de la jaro 1946, en la urbo Sopron, 11-jara knabo kolapsis dum la sankta meso. Li ne povis ekstarti sur la maldekstran piedon, kaj la kruro sub la genuo akre doloris. La kuracistoj diagnozis osteomjeliton de la tibio.

La knabo pasis du semajnojn en malsanulejo, du monatojn hejme en lito, kaj du jarojn kiel provata lernanto, jam en Budapeŝto. Li ne povis regule kaj longe iradi. Pri sporto li eĉ ne revis.

Unu el liaj kunlernantoj sugestis al li praktiki la **jogon**, kiu ne ŝarĝas la kruron. Do la knabo ekjogadis, inkluzive la jogan naĝadon kun spirad-regulado.

Du jarojn poste li partoprenis en 1500-metra kur-konkuro de la gimnazio, kaj jam kiel studento de geologio, en teren-kurado kaj longaj ekskursoj. Krome li regule naĝadis eĉ vintre en glacia akvo.

Lia kunstudento, kiu enkondukis lin al la jogo, iĝis fama profesoro-kuracisto kaj havis privatan klinikon – en Kalifornio. La 21-an de oktobro li ricevos altan distingon de la Budapeŝta Medicina Universitato.

Kio do estas tiu jogo?

Pri tio ekzistas tre diversaj, eĉ kontraŭdiraj opinioj. Certas nur, ke temas pri *korpa-spirita ekzercado de hindia origino*. La filozofia fono / fundamento estas la spirita unueco de la mondo, la identeco de la individua homa animo kun la Mondanimo, **Atman** (*panteismo*). Tiun principo ekzistantan unuecon la homo povas ne nur racie ekkoni, sed praktike sperti. Tio estas la “eklumiĝo”: ***Vi estas tio!*** Al tiu celo gvidas pluraj vojoj. Tiujn ordigis kaj priskribis **Patanĝali** en siaj *sutro*

- **Hatha Jogo:** la jogo de la korpo
- ◆ **Bhakti Jogo:** la jogo de la emocioj
- ◆ **Dhjani jogo:** la jogo de la ekkono
- ◆ **Kama jogo:** la jogo de la sekso
- ◆ **Raĝa jogo:** la reĝa (suprema) jogo

La ok stupoj de la jogo estas jenaj:

1. **Jama:** disciplino
2. **Njama:** mem-disciplino
3. **Asana:** sid-maniero, korpaj pozoj
4. **Pranajama:** regulado de la spirado
5. **Prathajara:** retiriĝo en sin mem
6. **Dhjarani:** koncentriĝo de la atento
7. **Dhjanam:** meditado/kontemplado

8. **Samadhi**: “resorbiĝo”: perfekta unuiĝo kun la objekto de meditado.
En la **Upaniŝadoj** (*Sekreta Doktrino*) estas skribita:

“Ne ekzistas pli malfacila vojo en la mondo, ol la vojo de la *joginoj*: tre malmulte da homoj iradas sur ĝi! Sed tiu, kiu elektas tion-ĉi, iĝas purigita por ĉiam. Li ne plendas pro mal-varmo aŭ varmo, li ne zorgas pri tio, ĉu li estas liberiĝinta el la ses ondoj de la anim-transmigrado... Paciĝinte, senmove, li diras: “**Mi estas la Unuo, la Ĝojo, la Konscio!**”...kaj per tio lia vagado estas finita.”
(*Parama-Hamsa* (Migra Birdo) *Upaniŝado*)

Por tio, oni devas havi gvidanton, **guru-on**:

“kiu bone konas la jogon, kaj vere praktikas ĝin, kies animon transformas kaj purigas la jogo! Nur tia instruisto, kiu respektas siajn majstrojn, kaj estas fidela servisto de la Sinjoro, estas digna pri la nomo **Guruo**. Ĉar *Gu* estas la malhelo, kaj *Ru* estas la lumo, kiu forigas ĝin, tiel la guruo venkas la Ne-scion.”

Jogo en Hungario

En Hungario, entuziasmaj adeptoj de la jogo estis en la unua duono de la 20-a jarcento **Ervin Baktay** kaj d-ro **Antal Weninger**. Populara estis la libro de **Selva Raĝa Jesudian** pri la Hatha jogo („Sporto kaj Jogo”).

Pro kaj kontraŭ

La fama svisa psiĥiatro **C.G. Jung** surbaze de sia propra sperto avertis, ke *la jogado povas malutili al la mensa sano de okcidentuloj, kiuj havas alian kulturen heritaĵon ol la orientuloj*.

Dum la dua duono de la 20-a jarcento multenombraj guruoj aperis en USono kaj Eŭropo, “por alporti la lumon de Oriento al la spirite malriĉa Okciden-to.” Malfacile estas distingi la mon-avidajn ĉarlatanojn de la sinceraj saĝ-uloj, tute speciale en la ezoterisma kaj pseudo-ezoterisma inundo de la **New Age** (*Nova Epoko*). La konflikto kun la tradicia kristana mondkoncepto kaj spirita disciplino iĝis ne-evitebla.

La franca **J. M. Dechanet** verkis libron pri *Kristana jogo en dek lecionoj*, as-ertante ke li retenis nur la “sanan kernon”, la esencon de la **Ha-Tha** (Suno-Luno) jogo.

P. Gál (katolika pastro) en sia verko “*La New Age per la okuloj de kristano*” detale pritraktas ankaŭ la jogon kaj kion li nomas *guruismo*. Lia konkludo estas senkompromise negativa.
Por kristana fidelulo ne estas akcepteblaj:

- (1) *filozofie* – la panteismo;
- (2) *teologie*: la ne-ekzisto de individua, spirita homa animo kaj la rein-karniĝo (transmigrado de la animo);
- (3) *etike*: la mem-savigo kiel celo, la doktrino pri la plur-viva *karma*, la individualisma indiferenco al bono kaj malbono;
- (4) *psiĥologie*: la liberiĝo de potence danĝeraj, eventuale diablaj fortoj (de la serpent-diino **Kundalini**), kaj la senrezerva obeemo al la *guruo*-superhomo.

Persona konkludo.

Mi, la iama malsana knabo, el persona sperto opinias, ke la tekniko de la Hatha Jogo povas esti psiĥo-somatike saniga kaj fortiga, kaj ke ne devas ligi ĝin al ne-akcepteblaj tezoj de ne-kristana mondkoncepto. Sed mi devas emfazi, ke tio ne estas facila, afero: estas bezonataj intensa korpa, intelekta kaj morala preparado kaj senĉesa kontrolo fare ne de guruo, sed kristana spirita gvidanto, por eviti la fatalajn kaptilojn.

Selektita bibliografio:

- Déchanet, J. M:** Kristana jogo en dek lecionoj – Sport Kiadó, Budapest 1991
Deussen, Paul: Filozofia upaniŝadelor (Filozofio de la Upanisado-j) – București 1994
Dudich, Endre: Arbaraj asketoj de Hindio. La mil-vizaĝaj Upaniŝadoj: ŝajno kaj realo.-- *En:* Aventurado en la historio de la filozofio. -- Jarlibro de la Filozofia Diskutro 2000.
Gál, Péter: La *New Age* per kristanaj okuloj – Abaliget, 1997
Jung, C. G.: Enkonduko al la psiĥologio de la nekonscia – Budapeŝto 1990.
Ruchpaul, Eva: La Hatha-jogo – Vitry-sur-Sine, 1985
Selva Raja Yesudian: Sporto kaj jogo – Budapeŝto 1942
Selvarajan Yesudian: Jogo de semajno al semajno. Ekzercoj kaj meditadoj por la tuta jaro. Szeged, 2000
Weninger, Antal: La jogo de la Oriento – Budapeŝto, 1987
Weninger, Antal: Jogo en la ĉiutaga vivo – Budapeŝto 1991.

Budapeŝto, je la 25-a de majo en 2005

Mi történik, mi történt májusban?

Az Országos Idegennyelvű Könyvtár (Bp) a májusi rendezvényeivel segíti az érdeklődőket ismereteik elmélyítésében. A rendezvényekről tájékozódhatnak az OIK honlapcímén <http://www.oik.hu>:

Május 9-én megemlékezés az 1805. május 9-én Weimarban elhalálozott *Friedrich Schiller* német költő és drámaíróról, aki Johann Wolfgang Goethe mellett a német klasszika legjelentősebb képviselője. Fő művei a „Don Carlos”, a „Tell Vilmos” és a „Wallenstein-trilogia”.

Május 18-án megemlékezés az 1937. május 18-án megszületett *Lászlóffy Aladár* romániai magyar költő, író (Hangok a tereken, A levelek vándorlása, Héphaistos, Az ólomkatona hadifogsága, Szövegek szövetsége, Házsongárd, Botrány Gordiuszban, Csudaóra).

Május 18-án megemlékezés az 1972. május 18-án meghalt *Csépe Imre* költő, íróról, a vajdasági magyar irodalom egyik kiemelkedő alakjáról.

Május 23-án megemlékezés az 1947. május 23-án meghalt *Charles-Ferdinand Ramuz* franciaul alkotó svájci író, elbeszélőről, akit Svájc legnagyobb írójaként ismertek el kortársai.

Május 23-án megemlékezés az 1972. május 23-án elhunyt *Kamil Beduar* cseh költő, műfordítóról, aki Petőfi Sándor verseinek kiváló átültetője.

Május 24-én megemlékezés *Cirill és Metód* napjáról, a bolgár kultúra és művelődés, a szláv írásbeliség és sajtó napjáról: Konstantin Cirill és bátyja, Metód görög szerzetes hittérítők emlékére.

Böde Józsefné- OIK. Bp.

Kio okasz, kio okazis dum majo?

La Landa Fremdlingva Biblioteko (Budapeŝto) helpas la interesiĝantojn per siaj aranĝaĵoj profundigi la konojn. Oni povas informiĝi pri la planitaj prelegoj sur la retpaĝo de la biblioteko <http://www.oik.hu>

La 9-an de majo: rememoro pri *Friedrich Schiller*, germana poeto kaj dramverkisto mortinta en Weimar la 9-an de majo en 1805, kiu - apud *Johann Wolfgang Goethe* – estas la

plej signifa reprezentanto de la germana klasikaĵo. Liaj ĉefverkoj estas: „Don Carlos”, „Vilhelmo Tell” kaj la „Trilogio-Wallenstein”.

La 18-an de majo: rememoro pri la rumania hungara poeto, verkisto *Aladár Lászlóffy*, kiu naskiĝis la 18-an de majo en 1937 (Liaj verkoj estas: Voĉoj sur la placoj, Migrado de la folioj, Hephaistos. La militkaptiteco de la plumbosoldateto, Ligo de Tekstoj, Hazĵongard (La tombejo), Skandalo en Gordius, Admir-horo).

La 18-an de majo rememoro pri la poeto, verkisto Imre Csépe, kiu estis elstara figuro de la vojevodina hungara literaturo, kaj mortis la 18-an de majo en 1972.

La 23-an de majo rememoro pri la franclingve kreanta verkisto svislanda, novelisto *Charles-Ferdinand Ramuz*, kiun liaj samtempuloj rekonis, la plej granda verkisto de Svislando, kaj kiu mortis la 23-an de majo en 1947.

La 23-an de majo rememoro pri la ĉeĥa poeto kaj artetradukisto *Kamil Beduar*, kiu estis la elstara tradukisto de poemoj de la hungara poeto Sándor (Ŝandor=Aleksandro) Petőfi.

La 24-an de majo rememoro pri la tagoj de Cirill kaj Metod, de la bulgara kulturo kaj kleriĝo, pri la tago de la slava alproprigo de la skribo kaj de la gazetpresado, por memoro de la grekaj monaĥoj-misiistoj Konstantin Cirill kaj lia frato Metod.

La kolekton de Ilona Böde (OIK-Bp) esperantigis Adrienne, s-rino Pásztor

39-a Landa Fervojistaj Esperanto-Amikaj Renkontoj

(Győr, Hungario, 30.06 - 01.07.2007)

Ĉijare la loka grupo de la Hungara Fervojistaj Esperanto-Asocio aranĝas la amikajn renkontojn de la fervojistaj esperantistoj en urbo *Győr*. Kore ni invitas niajn geamikojn el Hungario kaj el eksterlando. Ni mencias, ke ni jam dufoje (1971, 1991) aranĝis renkontojn en nia urbo. Dum ĉi tiu aranĝo ni festos la 50-jaran fondiĝdatrevenon de nia fervojista movado.

La loko de la renkonto estas: Hotelo Szárnyaskerék, Győr, strato Révai n-ro 5. (vid-al-vid al la stacidomo). Ni akceptos la gastojn jam vendrede, la 29-an ekde la 15-a horo ĝis 21 h. kaj sabate ekde la 8-a horo.

Tranoktado: En la *Hotelo Szárnyaskerék* ĉambro kostas 6.000 Ft-ojn. La ĉambro estas proviziita per varma kaj malvarma akvo. Banĉambro kaj necesejo estas komuna. La alia loko estas la studenthejmo de la gimnazio Kazinczy (300 metrojn distanco al la renkontejo) Ĉi tie estas 2-3-4 litaj ĉambroj. La prezo de la tranoktado estas 2.000 Ft-oj/nokto/persono.

Manĝado: Ni certigas matenmanĝon kaj tagmanĝon en la restoracio de la *Urbodomo*. La prezo de la matenmanĝo estas 500 Ft-oj (tre abunda svedtabla, laŭ elekto). Tagmanĝo kostas 1.200 Ft-ojn. La sabata vespermanĝo kaj balo okazos en la Restoracio *Zöldfa* (Str. Hunyadi, ĉ. 400 metrojn al la renkontejo). La kosto estas 1.500 Ft-oj (sen trinkaĵo)

Ekskurso: Ni ekskursos al la renovigita Abatejo de *Pannonhalma*. Pannonhalma estas parto de la Mondheredaĵo protektata de Unesko. La busvojaĝo estas 900 Ft-oj/persono. La enirbileto por viziti la preĝejon, galerion, bibliotekon kostas 1700 Ft-ojn/persono. Ni organizas fakultativan viziton kaj vingustumadon en la urba vinkelo "Borbírodalom" (Vinimperio). La partoprenantoj ricevas 7 diversajn specojn el la lokaj famaj vinoj. Pannonhalma estas ankaŭ malnova kaj fama historia vinregiono.

Aliĝkoto: 1.200 Ft./persono (por la organizadaj kostoj, programkajero ktp.)

Limdato por aliĝi kaj samtempe pagi la kostojn: **la 5-a de junio 2007**. Surloke aliĝon ni ne povas akcepti. Kiuj havas problemojn por sendi la monon, tiuj estas petataj kontakti la ĉeforganizanton telefone aŭ rete. La aliĝilon kaj monon ni petas sendi je la adreso de D-ro Imre Ferenczy, HU-9002 Győr, Pf. 143. telefono: 36-96/315-485. Retadreso: iferdr@t-online.hu. Post la limdato ni jam ne povas akcepti aliĝojn.

Programo:

Vendrede, la 29-an de junio: Ekde 15.00 h.: Akceptejo funkcias ĝis 20.00 h. en la hotelo.

Sabate, la 30-an de junio: 8.00: Matenmanĝo. Akceptejo funkcias. 10.00: Vizito de la urbo kun ĉiĉerono. 12.30: tagmanĝo. 14.00: busoj ekveturas al Pannonhalma. 15.00: Vizito de la abatejo ĝis 16.00 h. 16.30 - 17.15: Vingustumado por la aliĝintoj. Por aliaj: butikumado, vizito de gastejo, sukeraĵejo. 17.30: busoj ekveturas al Győr. 19.00: Vespermanĝo kaj balo en la restoracio Zöldfa

Dimanĉe la 1-an de julio: 8.00 - 9.00 Matenmanĝo. 10.00 - 12.00: Festa kunveno en la Hotelo Számyaskerék. Kiuj ne volas ĉeesti la kunvenon, tiuj havas eblecon viziti private diversajn lokojn de la urbo: katedralon, muzeojn kaj la modernan kuracbanejon. 12.30: tagmanĝo kaj fermo de la renkonto. Ĝis revido en urbo Győr!

Győr, la 12-an de aprilo 2007.

(Lajos Sleiner)
sekretario

(D-ro Imre Ferenczy)
prezidanto

A karalábé

Az egészséges táplálkozás és a megfelelő testmozgás szükséges az egészséges élet megvalósításához. Májusban már fogyaszthatunk az új, a korai zöldségekből.

Ajánljuk a karalábé fogyasztását.

A **karalábé** kétéves növény, mely a második évben érleli be a magvakat. A hajtástengely alapi része vaskos gumóvá duzzadt. Magassága általában 30 cm. A gumó, a levél, a levélnyel színe nagyon változó. Lehet pl: fehér, fehéreszöld, kékeslila, stb. A gumó alakja is változó. Lehet: gömbölyű, lapított gömb, hosszúkás, alma alakú, stb. Egész évben szerepel az étrendünkben. A hideg iránt a gumóképződés idején érzékeny. Nagy a vízigénye. Tápanyagban gazdag, főleg a káliumban gazdag talajt kedveli.

Korai fajtáit május, júniusban szedik. Nyers fogyasztásnál egy közepes nagyságú karalábé fedezi 1 napi C-vitamin szükségletünket!

A kisebb, zenge leveleit is nyugodtan elfogyaszthatjuk, mert nagyon nagy az ásványianyagtartalma.

Például, a benne található kalcium és magnézium védi a csontokat. A C-vitamin és a karotinok erősítik immunrendszerünket.

A karalábében szintén megtalálható mustárolaj és egyéb növényi olajok védenek más betegségekkel szemben.

Pásztor Lászlóné

La brasikrapo

La sana memnutrado kaj la konvena korpoekzerco estas bezonataj al la realigo de la sana vivo. Dum majo ni jam povas manĝi el la novaj, fruaj legomoj.

Ni proponas manĝi la brasikrapon.

La brasikrapo estas dujara kreskaĵo, kiu en la dua jaro maturigas la semojn. La baza parto de la ĝermospindelo kreskiĝas al dika tubero. Ĝia alteco estas ĝenerale 30 cm. La koloro de la tubero, folio, folio-tenilo tre varias. Povas esti ekzemple: blanka, blankverda, bluelila, ks. Ankaŭ la tuberformo varias. Ĝi povas esti globforma, platigite-globforma, long-, pomforma ktp. Dum la tuta jaro ĝi ĉeestas en nia menuo. Pro la malvarmo ĝi sentemas dum tempo de la tuberiĝo. Ĝi estas tre akvodrezira. Ĝi enhavas multajn nutrajmaterialojn kaj favoras grundon ĉefe abundan kalion enhavantan. Ĝiajn fruktajn speciojn oni rikoltas fine de majo kaj en junio. La manĝo de kruda, mezgranda tubero certigas nian tagan bezonon por vitamino C. Se eblas, ni manĝu trankvile ankaŭ ties pli malgrandajn malfortajn foliojn, ĉar ili havas altgrade mineralajn salojn. Ekzemple, la kalcio kaj magnezio en ili troveblas ŝirmas la ostojn.

La vitamino C kaj la karotinoj fortigas nian imunsistemon.

En la brasikrapo same troveblas izotiocianatoj kaj la ceteraj kreskaĵoleoj ŝirmas kontraŭ aliaj malsanoj.

A KARALÁBÉS CSIRKE

Hozzávalók: 1 csirke, ½ kg karalábé, 3 evőkanál olaj vagy 5 dkg vaj, 1 evőkanál liszt, 1 dl tejföl, 1 csokor petrezselyemzöldje, só, csipetnyi törött bors.

A csirkét feldaraboljuk, és a megforrósított zsiradékon élénk tűzön néhány percig pirítjuk. Megtisztítjuk és hosszúkás, vékony szeletekre vágjuk a karalábét, a csirkéhez adjuk, megsózzuk, megborsozzuk és nagyon kevés vízzel, időnként megkeverve az egészet puhára pároljuk.

Végezetül zsírára sütjük, a liszttel elkevert tejföllel behabarjuk. Meghintjük a finomra vágott petrezselyem zölddel és még 5 percig állandóan kevergetve tovább pároljuk.

Különösen a tavaszi, zenge karalábéből jó ez az étel.

Adhatunk hozzá párolt rizst is köritésnek.

LA BRASIKRAPA KOKIDO

Ingrediencoj: 1 kokido, ½ kilogramoj da brasikrapoj, 3 manĝkuleraj kvantoj da oleo aŭ 5 dkg da butero, 1 manĝkuleraj kvanto da tritikfaruno, 1 dl da acida (bovina) lakto-kremo, 1 bukedo de petroselverdaĵo, kaj salo, pipro laŭguste.

La kokinon ni dispecetigas kaj la pecojn – sur la varmegigita grasaĵo super forta fajro – ni fritas kelkajnminutojn. La brasikrapojn ni purigas kaj tranĉas longecajn, fingrodikajn tranĉaĵojn kaj metas al la kokido. Poste ni saligas, piprumas la tuton laŭguste, kaj per malmulte da akvo – foje-foje kirlante – la tuton stufas al mola. Fine, ni bakas sur ĝian grasaĵon kaj per la faruno kirlita acida laktokremo ni farunmiksumas. Poste ni superŝutas ĝin per petroselverdaĵo distranĉita je malgrandaj pecoj kaj ĉiam kirlade ankoraŭ 5 minutojn ni plustufas. Ĉi tiu manĝaĵo farita el printempa nematura brasikrapo estas la plej bongusta

Por garnaĵo, ni povas aldoni kuiritan rizon.

Adrienne, s-rino Pásztor

Idézetek

A soknyelvűséget kiküszöbölni nem lehet, de megkerülni igen: egy általános és közös másodnyelv segítségével.

Deme László

Létfontosságú az emberiségre nézve, hogy a világ minden iskolájában, mindenkire kötelezően tanítsanak egy közös nyelvet a nemzeti nyelv mellett.

Öveges József

(Országos Idegennyelvű Könyvtár Budapest – Böde Józsefné, Ilona)

Citaĵoj

La multlingvecon oni ne povas forigi, sed eviti jes: per helpo de iu ĝenerala kaj komuna dua lingvo.

László Deme

Vivneceso estas por la homaro, ke en ĉiu lernejo de la mondo oni instruu unu komunan lingvon – krom la nacia lingvo.

Jozefo Öveges

(Landa Fremdlingva Biblioteko – Ilona, s-rino Böde)

Esperantigis László Pásztor

József Attila

Attila József

Attila Joĵef

Tedd a kezed

Tedd a kezed/Tuŝu frunton

Tedd a kezed/Frunkaresu

Tedd a kezed
homlokomra,
mintha kezed
kezem volna.

Tuŝu frunton
mian mane,
kvazaŭ mi mem
tuŝus, same.

Frunkaresu
min, kun amo -
por mi propru
via mano.

Ügy őrizz, mint
ki gyilkolna,
mintha éltem
élted volna.

Gardu min kun
murda emo,
kvazaŭ vi 'stus
mia memo.

Gardostaru
kun murdemo -
por vi propru
mia memo.

Úgy szeress, mint
ha jó volna,
mintha szívem
szived volna.

Amu, kvazaŭ
bone estus,
mia koro
en vi nestus.

Amu plene
sen angoro -
por vi propru
mia koro.

(1927)

(1928. Trad. Márton Fejes)

(1928. Trad: Imre Szabó)

(Attila József: Urboranda Nokto – Elektitaj poemoj – Budapest 1986)

Karaj niaj legantoj!

Ni petas vin volonte akcepti la sekvan epizodon de la historio de Ada Sikorska-Fighiera,

„La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka”

(Priskribitaj de G.C. Fighiera)

Torino, 2002

NOTOJ PRI LA VIVO DE ADA

(Ada Fighiera-Sikorska: tiel ŝi skribis sian nomon.)

En sia verko „De tajgo al minaretoj” Ada priskribas la infanajn jarojn en Siberio, kien ŝi estis deportita de la soveta armeo kun sia familio kaj centmiloj da poloj komence de la Dua Mondmilito. (la patron, generalo Sikorski, murdis la sama armeo en la arbaro de Kattyn kun dekmilo da polaj oficiraj milit-kaptitoj)

La mallonga teksto, kiu inspiris teatraĵeton de pola aktorino, konsistas el taglibro kaj kolekto da leteroj de ŝi senditaj el Siberio al sia onklino en Pollando, ekde 1940 (kiam Ada estis 11-jara.) La vivo-vera biografia rakonto estas iamaniere komparebla – pro historia kadro, drameco kaj infana spontaneco – al la taglibro de Anne Frank.

Sen patoso kaj sen plendoj, kun infana senornamo, la infano Ada rakontas pri malvarmo, malhigieno, malsato, malsanoj, suferoj, sed ankaŭ pri kelkaj simplaj ĝojoj dum tiuj militaj jaroj, ĝis la liberiĝo danke al la interkonsento inter Sovetunio kaj la brita registaro, posta vojaĝo al Irano kaj Libano, kie ŝi studis du jarojn en polaj lernejoj kaj postmilita reveno al Varsovio; tie la onklino redonis al Ada la garditajn leterojn nun publikigitajn.

Ada lernis Esperanton en 1956/1957 kaj edziniĝis al G.C.Fighiera en 1960 en Bruselo. Komence, ili vivis unu jaron en Harrogate (Britujo), kie la edzo deĵoris kiel KKS; en 1961 ambaŭ revenis al

Bruselo (Belgio) kaj tie loĝis 17 jarojn pro labor-cirkonstancoj de la edzo; ekde 1978 ili samkiale restadis en Madrido (Hispanio) dum 10 jaroj; en 1988 ili definitive instaliĝis en Torino (Italio). Ekde 1962 ĝis sia morto en 1996 Ada redaktis la gazeton „Heroldo de Esperanto”. La sola komunik-lingvo inter Ada kaj la edzo ĉiam estis nur Esperanto.

Enkonduko

Pasis ses jaroj de tiu 7-a de aŭgusto 1996, kiam mortis Ada, sed eĉ ne unu tago pasis, sen ke la rememoro de tiuj dramaj momentoj akompanu min. La cirkonstancoj travivitaj kaj la vortoj diritaj en la lastaj du monatoj de ŝia vivo ĉiam spontane renaskiĝas en mia konscio, tiel freŝaj kiel se la eventoj estus okazintaj hieraŭ. Mi plue apenaŭ kredas, ke ŝi forpasis. Ŝi aĝis 67 jarojn, do multe pli juna ol la averaĝa vivo-daŭro de virino, kaj aspektis kiel bildo de bonfarto: ĉio supozigis, ke ŝi longe postvivus min.

En ŝia morto plej frape fontas sento pri maljusteco denove suferita de valora homa estaĵo: la homan kondiĉon, la vivon kaj la morton ne regas ordo kaj logikaj leĝoj, sed kaoso kaj malracio. Ada ne meritis antaŭtempe morti, ĝuste en sia viv-momento de fizika kaj intelekta plenforto, de energia kaj idealisma agado, de forta altruisma sindediĉo, de multaj kulturaj kaj vivaj interesoj, de utilo al la ĉirkaŭanta mondo.

Por ke Ada vivu ankaŭ en la memoro de ŝiaj amikoj kaj estontaj generacioj, mi deziras rakonti ŝiajn lastajn tagojn.

(G.C.F.)
Oktobero 2002

LA LASTAJ TAGOJ DE ADA, ADUŜKA

Komenco de la fino

Junio 1996. Ada, eniris en la hospitalon kor-malpeze, kvazaŭ temus nur pri nova sperto en ŝia eventoplana vivo. Fakte, nekonataj situacioj ĉiam vekis en ŝi scivolon kaj kuraĝan reagon. Spite de fortaj doloroj ŝi ne timis pri la evoluo de la momenta malbonfarto, konvinkita, ke resaniĝo estas nur demando pri tempo.

Ĝis kelkaj antaŭaj monatoj, Ada elsprucis energion: ŝi ne moviĝis, sed laŭvorte kuradis la tutan tagon kiel nehaltigebla forto de la naturo, kiel homa vulkano. Ankaŭ vintre ŝi dormis kun malfermita fenestro kaj komencis la tagon je la 6-a h. matene, en la lastaj jaroj eĉ iom pli frue; ŝi estus povinta ripozi pli longe, sed asertis „mi ne volas tradormi la tutan vivon”. La vekigon tuj sekvis duonhora gimnastiko, tiom vigla, ke ŝi povis renversi ĉion apudan per siaj movoj. Dum la resto de la tago ŝia senlaca labor-forto ne konis paŭzon: redaktado de la gazeto, korespondado, legado, mastrumado, sociaj rilatoj. En la aĝo de 67 jaroj, ŝi aspektis 50-jarulino.

Ada sentis sin sana kaj forta; en 36 jaroj de komuna vivo neniam aperis ĉe ŝi la kutimaj ĉies malsanetoj, eĉ ne kap-doloro, malvarmumiĝo aŭ gripo. De jardekoj ŝi sekvis ĉiujn preskribojn medicinajn por korekta vivo: nefumado, nekafumado, nedrinkado, fizika moviĝado, ekvilibra nutrado (dieta sen salo, manĝoj malgrasaj kaj malriĉaj je kolesterolo, fiŝoj, blankaj viandoj (neniam ruĝaj), cerealoj, multe da legomoj kaj fruktoj). Ŝia intelekta kaj emocia vivo estis riĉega. Ne ekzistis nobla celo, idealo, homa valoro, kiu ne vekis ŝian ardan kaj aktivan apogon: Esperanto, ekologio, protekto de animaloj, virina emancipado, defendo de etnaj minoritatoj, monda malarmado, ĉio trovis ĉe ŝi kunbatalanton.

Nur du antaŭaj farto-krizoj. La unua

Depost la infanaj milit-jaroj – dum la familia Siberia deportiĝo (priskribita en ŝia verketo „De tajgo al minaretoj”), kiam ŝi malsaniĝis ĉefe pro subnutrado kaj malhigieno - nur dufoje ŝia farto serioze krizis.

La unuan fojon, revenante el Pollando al Bruselo, dum la tuta aviadila veturado, senhalte sango nazfluadis: post alteriĝo, kuracisto prognozis tro altan sango-premon: tiu fenomeno poste ne ripetiĝis (ŝi kuracis sin ĉefe per naturmetodoj, konfidante i.a. je la proprecoj de ajlo), sed restis la timo, ke malantaŭ la dirita simptomo kuŝas san-danĝero: prudente, ŝi periode kontrolis la sangopremon, kiu iom normaligiĝis. La dua krizo tuj montriĝis multe pli grava. El ĝi supozeble – kvankam necerte-originis, 11 jarojn poste, la fina malsano; tial ni dediĉu al ĝi priskribon.

La dua farto-krizo

1985. Ni tiam vivis en Madrido, kie mi laboris ĉe MTO (Monda Turisma Organizo). Iun matenon, okaze de kutima memesploro, Ada rimarkis malmolan internan kreskaĵon en la dekstra mammo: ŝi tuj komprenis, pri kio temas, kaj ekploris. Sen diri ion al mi, Ada senprokraste vizitis specialiston, kiu konfirmis, ke temas pri tumor: ĉu benigna aŭ maligna oni scios nur post kirurgia malfermo kaj analizo de la malsana parto. Pro tio, ke Ada estis planinta veturi post tri monatoj al la Universala Kongreso kaj sinsekve liber-tempi en Pollando, la kuracisto kompreneme sugestis prokrasti la operacion ĝis la reveno. Tiun konsilon Ada kuraĝe rifuzis: ŝi preferis tuj forigi la problemon per kirurgia interveno.

Estis antaŭvidite, ke la operacio konsistos el du momentoj: dum la unua la kuracistoj malfermos la korpo-parton, forprenos kelkajn malsanajn ĉelojn kaj refermos la vundon; se la analizo montros benignan tumoron, ne necesos ion alian entrepreni. En kazo de maligna formo, kelkajn tagojn poste estos okazinta la dua parto, nome la ablacio, science difinita mastektomio. Tia estis la kirurgia proceduro, tiam.

Danke al la cirkonstanco, ke ni MTO- funkciuloj ĝuis privatan san-asekuron, mi povis mendi urĝan enhospitaligon ĉe privata kliniko en Madrido. La kirurgia interveno okazis la sekvantan tagon je la 23-a horo. Antaŭ ŝia forporto al la operacia salono ni interŝanĝis kelkajn am-vortojn. Kuŝante en rul-lito, ŝi aspektis serena, kvazaŭ la operacio koncernus alian personon. Je noktomezo, en la ĉambro, kie mi atendis, sonoris la telefono. „Ĉi tie la operacia salono”. La sango frostiĝis en mi. ”Ne timu! Ĉio ĝis nun en ordo!; la esploro montras, ke temas pri maligna kancero. Ĉu vi konsentas, ke jam nun okazu la dua operacio?” Decidi ankaŭ en ŝia nomo estas facile: Ada senhezite konsentus.

